

v-22 644/10 (1923)



G. WHITELEY,
Cloth Fabrikisto Merchant
50, Clough Lane, Mirrindon,
Halifax, England.

ITALA ESPERANTA REVUO

SUB PATRONADO DE LA "ITALA KATEDRO DE ESPERANTO,"
OFICIALA ORGANO DE LA "ITALA ESPERANTISTA FEDERACIO,"

X^a JARO - N. 3

MARTO 1923

.....
: A. PAOLET, ELDONANTO : : S. VITO AL TAGLIAMENTO (ITALIO) :



Gvidlibro tra Trentino paĝ. 277, riĉe ilustrita	Itala Svisio, fama somera kaj vintra liber- tempasidejo ; mondfama regiono por vintraj sportoj kaj kuracado.	L. 3
Gvidlibreto de Ravenna paĝ. 20, ilustrita	La antikva urbo, centro de bizantia arto, rifuĝejo kaj tombejo de Dante Alighieri	L. 1
Gvidlibro de Bologna paĝ. 20, ilustrita	Sidejo de fama universitato kaj de gravaj in- dustrioj	L. 1
Rimini paĝ. 40, ilustrita	La belega urbo de la adriatika marbordo	L. 2
te Gramatiko de Itala lingvo PER ESPERANTO	La gramatiko konsistas el 42 lecionoj, kun itala prononco sub esperanta alfabeto.	L. 13
Vortaro Itala Esperanta	de Meazzini	L. 5
Vortaro Esperanta Itala	de Meazzini	L. 2.50
“Itala Esperanta Revuo” , (abono: 20-foje la kosto por a- franko de ordinara letero al Ek- sterlando laŭ nacia tarifo)	Monata revuo, kiu ĉiam enhavas artikolojn pri la naturaj kaj artaj italaj vidindaĵoj kaj tra- dukojn el itala mondfama literaturo	
Anekdotoj pri Dante paĝ. 24	Historietoj pri la vivo de tiu ĉi mondkonata poeto	L. 0,50
La pesto en Milano dum 1630	El « La Gefianĉoj » de Manzoni	L. 2
la Italaj Rakontoj paĝ. 75	El « Cuore » de De Amicis: bonega ekzercilo precipe por komencantoj: flua traduko	L. 3
Pri la devoj de l' homoj	de Pellico: enhavas pensojn ĉiam novajn kaj aktualajn	L. 3
Ŝakludado	de Giacosa: teatraĵo tre konata en Italio, certe interesa ankaŭ al fremduloj	L. 3
Dua ekzercaro paĝ. 32	Ŝtoneto de la granda verko de nia majstro Zamenhof. Ĝi enhavas ankaŭ italan tradnkon	L. 1
Parva Grammatica internatio- nalis idiomatis Esperanto	taŭga por pastroj kaj kleruloj	L. 1
NOVA ELDONAĴO : La geografia koncepto “regiono” , de D. ^{ro} U. Toschi.		L. 1

Jarabonoj: ITALIA Lire 10 (Numero separato L. 1) — EKSTERLANDO: 20-foje la kosto por afraĵo de ordinara letero al Eksterlando laŭ nacia tarifo (sendota en nacia mono per rekomendita letero).

:: Direkcio de la Revuo: S. VITO AL TAGLIAMENTO (ITALIO) ::

ENHAVO DE JENA NUMERO

INTERNACIA KONFERENCO POR KOMUNA KOMERCA LINGVO EN VENEZIA	37
DE ALPOJ AL LA MARO	
<i>Venecia Grandà Kanalo</i> , J. Bonini	39
<i>La klimata loko Cortina d' Ampezzo</i> , B. Apollonio	43
<i>Karnia legendo</i> , M. A. Camurri	43
RIMOJ KAJ VERSOJ	
<i>Ĝis la celo!</i> P. S. Ravanelli	44
BRAMANTE, MIKELANĜELO KAJ RAFFAELLO, trad. A. Mazzolini	45
ITALA ANIMO	
<i>Kikibio.....</i> (Boccaccio), trad. R. Orenco	48
<i>La diantoĵ, la rozoj kaj la violetoj</i> (Gozzi), trad. E. Filippi	49
RECENZAJ NOTOJ	50
SFINKSA ANGULO	51
LA SPRITO DE D' ALIAJ	52
FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA	
Parte Ufficiale	53
CATTEDRA ITALIANA DI ESPERANTO	
Atti Officiali	54
Itala kroniko	55
Internacia Scienca Asocio, Internacia Teknika Asocio	56

:: PREZO DE LA REKLAMOJ (unufoje) ::

KOVRILO: 4-a paĝo tuta L. 200 - ¹/₂ L. 110 - ¹/₄ L. 60 - ¹/₈ L. 35
 » 3-a » » 160 - » » 90 - » » 40 - » » 30
 INTERNAJ PAĜOJ de la Revuo » 120 - » » 70 - » » 40 - » » 25
 MALGRANDAJ ANONCOJ: Ĉiu vorto L. 0.20 (minimume L. 2).
 KORESPONDADO: Ĉiu vorto L. 0.10 (minimume L. 1).

6-foje rabato 10 oĝo — 12-foje rabato 20 oĝo.

ANTAŬPAGO

ITALA ESPERANTA REVUO

X^a JARO

MARTO 1923

N. 3

SALUTO AL LA GASTOJ

Uuuafoje vi venas oficiale kaj are, la civitanoj de Esperantujo, en nia sunoromata lando jarmilhistoria.

Ni bondeziras al via laboro, ni antaŭenpuŝas niajn manojn por premi la viajn.

Dum ie kaj ie ankoraŭ klopodadas oniuj por detruigo, al vi, celantoj de l'plej elfundaj rimedoj por mondrekonstruo, de ĉie venintaj, ĉien morgaŭ disflugontaj, la bondeziron ke la semo, kiun vi forportos, fruktodonu sepfoje sepdek el tiu mondgrundo, kie la radikoj de ekonomia kaj de idea vivo sin interligas fortike en la malhelaj internajoj de historio.

Helpu ni al ni, nepre helpos Di'.

Serioze. Animtrankvile. Fide.

Itala Esperantista Federacio
Itala Esperanta Revuo

INTERNACIA KONFERENCO POR KOMUNA KOMERCA LINGVO

VENEZIA — 31 Marto-4 Aprilo 1923.

ĜENERALA TAGTABELO

Sabaton 31^{an} de Marto. — Akceptado - Preparaj kunvenoj.

Dimanĉon 1^{an} de Aprilo, PASKO.

Matene : Diservoj katolika kaj protestanta ;

Ptgm. — Vizito al la urbo (en tiu tago eble okazos la Solena Akceptado en Napoleona Salono de Reĝa Palaco kaj la Ekskurso al Estuario, organizitaj de Urbeŝtraro) ;

Vespere — Vesperado interkonatiga en kafejo.

Lundon 2^{an} de Aprilo.

Matene — Malfermo de laborkunsidoj en ejo de Komerca Ĉambro ;

Ptgm. — Ordinara kunsido en Hotelo Wagner.

Vesp. — Kunvenoj : a) de anglalingvanoj ; b) de Nacia Konsilantaro de FEI ; c) de komisiono por reformo de FEI.

Mardon 3^{an} de Aprilo.*Matene kaj ptgm.* — Du laborkunsidoj.*Vesp.* — Teatra prezentado.**Merkredon 4^{an} de Aprilo.***Matene* — Laborkunsido.*Ptgm.* — Solena fermo.*Vesp.* — Komuna oficiala vespermango.**Jaŭdon 5^{an} de Aprilo.***Ptgm.* — S-ro Aug. Pitlik, Del. de Praha Foiro, parolos en Teatro "Italia," pri Praha kaj P. F. kun filmoj.**UNUA PROVIZORA LISTO DE ORGANIZADOJ OFICIALE RIPREZENTATAJ.**

- 1-40 **Komerciaj Ĉambroj** — *Italio*: (13) Bologna, Cagliari, Catanzaro, Cremona, Lecce, Mantova, Padova, Potenza, Pisa, Siena, Treviso, Verona, Venezia;
Francio: (6) Paris, Lyon, Deux Sèvres, Thier, Lure, Tarare;
Anglio: (2) London, Badford;
Aliaj: (10) Hradec Kralove (Ĉsl.), Lausanne, Sion, Genève, Budapest, Braila, Arad, Brno, Sacramento (U.S.A.), Lugano;
Internaciaj: (9) Itala K. Ĉ. en Belgio, Itala-Germana, Itala-Svisa en Genève, Itala Ĉ. K. en Casablanca, Ĉina K. Ĉ. de Siamo, Franca K. Ĉ. en London, Belga Ĉ. K. en London, Nederlanda K. Ĉ. en Milano, Itala-Rumana K. Ĉ.
- 41-50 **Specimenfoiroj** en Ljubljana (SHS), Frankfurt, Praha, Bordeaux, Paris, Lyon, Reichemberg, Barcelona, Milano, Padova.
- 41-55 **Mondfirmoj** — Welthandelsgesellschaft, Wien (Aŭstrio) - A. Vogt, Bankisto en Stuttgart - Karl Lassen, transportfirmo en Berlin - Houlett & White en Norwich - Dr. Fischer, grandindustriisto en București (Rumanio).
- 56 Bureau Suisse pour le Tourisme, Zürich (Svisl.).
- 57 Société Coopérative des Consommateurs, Genève (Svisl.).
- 58 Association Suisse des Hôteliers - Syndicat de Genève.
- 59 Confederation Generale de l'Ameublement, Lyon (Franc.).
- 60-61 R. R. Istituti di Studi Commerciali en Genova kaj Venezia.
- 62 R. Scuola Professionale Regina Margherita en Bologna.
- 63 Rotary Club en Harrogate (Angl.).
- 64 Persa Delegacio ĉe Ligo de Nacioj.
- 65 Komerca Ministerio de Ĉekoslovakio.
- 66 Germana Regna Ministerio por Internaferoj.
- 67-77 **Esp. institucioj** — Int. Komitato por K.K. Lingvo - U. E. A. - Itala Esp. Federacio - Brita E. Asocio - Mediteranea E. Fed. (Francio) - Austruja E. Delegitaro - Esp. Instituto por la Germana Respubliko - Rumanlanda Esp. Centro-Svisa E. Societo - Itala Katedro de Esp. - Interfoira Komisiono Internacia.

(Tiel la 15-an de marto 1923)

DE ALPOJ AL LA MARO

VENEZIA GRANDA KANALO (CANAL GRANDE)




te

PROFUNDA impresio kiun Venecio lasas en la animo, estas tiu de ĝia *Canalazzo* (Kanalaco), kiam nokte trasulkinte per gondolo, oni trapasas silentemaj, oni glitas sur la kvietaj akvoj, kiuj reflektas la admiregindajn palacojn, la pontojn je stranga formo.

kutimo, per kantoj de harmoniaj oktavoj de *Tasso* respondas...

Alie, bela kaj ne malpli neforgesebla estas la Granda Kanalo tutplena da gondoloj kaj beatoj je malsamaj dimensioj kaj formoj, flagornamitaj je cent koloroj kaj lumigitaj per miloj da lanternetoj, kiam, laŭ antikvaj moroj, oni ludas, aŭ



la

VENEZIA — Granda Kanalo (Vetkurado)

Sub la arkajo de l' ĉielo fortege lazura de veneciaj noktoj, kaj dum la lunaj radioj pluvus sur tiun kronon je marmoroj, sur tiun triumfon de pasintaj grandecoj, oni etendas la orelojn je l' kanto de gondolisto, kaj al tiu de aliaj gondolisto, kiuj per malnova kaj poezia

serenadojn aŭ vetkuradojn.

Poetoj vokas ĝin la plej bela strato de la tuta mondo; pentristoj ĝin ilustrigis en ĉiuj manieroj, kaj tiu ĉi veroco estas ĉiam certigita.

Estas fakto, ke la Kanalaco, kiel oni nomas en Venecio, tiun ĉi longan kaj


tre larĝan vojon, kiu dividas la Urbon en du partoj preskaŭ egalaj, tute flankumita de belegaj palacoj, kiuj kontrastigas la elegantajn liniojn de gotika arkitekturo kun la pezaj, barokaj kornicoj, difinas ion, kiu tuŝetas la animon.

Estis iu, kiu volis certigi ke origine la Kanalo estis lito de rivero, pruvante tiun ĉi, pro ĝia malrekteco, opinio elmontrita nevera per la fakto ke ĉiuj kanaloj de venecia laguno estas neregulaj kaj nerektaj.

Kanalacon oni ne priskribas: por la scivolemaj ni nur diras:

Ke ĝi ekkomencas je *l' pinto de la Saneco* (Punta della Salute) kaj finiĝas ĉe la fervoja stacidomo. — Enfluas en ĝi preskaŭ 45 Kanaletoj (Rivi), kaj antaŭe estis traŭrata de nur unu ponto — tiu de *Rialto* — al kiu en la lastaj tempoj oni aldonis du aliajn el fero;

Ke, kiel en la tuta Urbo, la domoj kiuj ĝin flankas, ĉiuj portas signon de venecia arto, kaj ke arkitravoj, balkonoj,



VENEZIA — Ponto nomata Rialto

Estas fakto ke la Kanalo estis, jam de la pratempoj, ĉefa arterio de la Urbo, kaj al ĝiaj flankoj, dum la venecia progresado, estis konstruitaj la palacoj kiuj ĝin ornamas.

Nur en jaro 1585 Estraroj de venecia Respubliko por doni pli grandan regulecon al tiea vojo, elspezante grandegan sumon, profunde fosigis kanalon, ĝin nereguligante inter ĉiuj partoj kie fundo surakvigis.

korniccj reliefas majestan originon;

Ke la monumentaj palacoj estas ne malpli ol sesdekok, ĉiuj kolosaj, ĉiuj grandiozaj.


Ke al la palacoj oni devas aldoni aliajn monumentojn, ekzemple: *Doganon* kaj Preĝejon de *La Saneco* (La Salute), Abatejon de *S. Gregoro*, Preĝejon de la *Karito*: la konstruaĵojn malnovajn kaj novajn de *Rialto*, la *Magazeno de l' Germanoj* (Fóndako dei Tedeski), la Preĝejon

de S.^{ta} *Eustako*, *Tenejo* *cù provizejo* de *l' Turkoj*, (itale *Fóndako dei Turchi*), kaj *Preĝejojn* de *S. Simono* la malgranda, de *S. Jeremio* kaj de *Scalzi* (Skalci).

Historio de *Rialta Ponto* de ĉiuj estas sciigita: en jaro 1180 oni kunigis la du bordojn de la Kanalo per ponto de barkoj, kiu estis nomita de la *Quartarolo* (Kvartarolo) pro monero tiel nomita. kiun oni pagis por ĝin trapasi. Poste, ĝi dum 1264 estis fondita sur palisoj, sed dum 1310 estis detruita en la epoko de *Tiepolo*'a konspiro. Renovigita, ĉiam

stratoj kaj sur siaj flankoj portas du vicojn da butikoj.

Inter la palacoj, la plej notindajn ni rimarkas, laŭ graveco: tiun de *Contarini-Fasan* (Kontarini), en gotika stilo de XIII^a jarc.; tiun mirindan konstruegajon, kiu estas la palaco *Corner della Ca' Grande* (Korner de la Granda Domo), nun sidejo de Prefektejo, konstruita de l'fama arkitekturo *Jacopo Sansovino* (Jakopo) en 1532^a: palacon *Cavalli* (Kavalli) nun *Franchetti* (Franchetti) en gotika stilo de XV^a jar.; palacon *Rezzonico*



la VENEZIA — Preĝejo de S.ta Marko

per ligno, en 1450, ĝi enfalis post multaj jaroj pro pezo de granda popolamaso alkurinta por asisti trairon de Markizino el Ferrara.

Fine, post alia rekonstruado per ligno, venecia senato dekretis rekonstruadon per ŝtonoj dum 1588, elektante desegnon, laŭ iuj, de Antonio *Daponte* kaj laŭ aliaj, de *Alvise Boldù*. Ĝi estas formita de nur unu sola arkaĵo kiu mezuras je rektoŝnuro 28 metrojn, estas alta 7 metrojn kaj larĝa 22: ĝi estas dividita per tri

(Reconiko), en baroka stilo, tamen, ĉiam admirindan: palacon *Foscari* (Foskari), rekonstruigitan de l' fama Doĝo, kaj antaŭnelonge, per zorgo de venecia Komunumo, kiu estas nun ĝia posedanto, oni redonis al ĝi la orumajon sur la blazonsildetoj kaj sur la kornicoj, kiel ili jam estis dum la XV^a jarc. Nun, ĝi estas okupata de Supera Komerca Lernejo:

La palacon *Corner-Spinelli* (Korner) laŭ la stilo de fratoj *Lombardo*: la *Tiepolan* palacon en stilo renesanca: palacon *Gri-*

mani, grandiozan konstruaĵon de l' arkitekturisto *Sammichieli* (Samikieli), konstruitan je la fino de la 1500^a jaro;

La palacojn *Farsetti* kaj *Loredan* (nun sidejon de venecia Komunumo) starigitajn en Bizantia-lombarda stilo en la XII^a jarc.: tiun juvelon kiu estas la palaco de la *Camerlenghi* (Kamerlengoj), verko de *Guglielmo Bergamaschi* (Bergamaski); palacon *Pesaro*, vastega amaso da ŝtonoj, en la dekadenca stilo, konstruita de *Baldassare Longhena* (Longena) dum

1679: la *Ca' d' Oro* (Ora domo), unu inter la plej ravaj ornamaĵoj de la Granda Kanalo, desegnita en la plej perfekta gotika stilo.

Fine: la palacon *Vendramin Calergi* (Kalerĝi), mirindan konstruaĵon de *Pietro Lombardo* dum 1481, la plej belan inter la palacoj en Lombarda stilo, kiuj ekzistas en Venecio. — En tiu ĉi palaco mortis R. Wagner.

Februaro 1923.

Johano Bonini.



VENEZIA — Preĝejo de la Saneco (La Salute)

La klimata loko Cortina d' Ampezzo

KIU volas ĝui la karakterizajn belajojn, kiujn prezentas en la vintra sezono la naturo de tiu ĉi belega dolomia konko, profitu je la malmultaj semajnoj de nun ĝis la duono de la venonta monato.

En la nuna tempo, malpeza nega tavolo, kiu falis antaŭ kelkaj tagoj sur tiu kompakta de la pasinta decembro, vere taŭgigas la tersupraĵon por la skiistaroj.

La Sportklubo de Cortina (Kortina) montrigas tre agema, organizante oftajn konkurojn por ŝkioj kaj por malgrandaj glitveturiloj; kaj multaj hotelistoj, esperante grandan fremdan konkurson, enmetis en iu hotelo la plej modernan varmigon.

Se la vetero konservigas favora, oni povas esperi ke tiu ĉi lando altiru grandan utilon per la vintra sporto.

Tamen mi opinias ke la vera famo, kiun ĝi ĝuas kiel klimata kuraca loko, devenas precipe de la ĝojegoj, kiujn ĝi prezentas dum la somera sezono.

La aera pureco, la blua ĉiela arkaĵo sur kies horizonton siluetigas la majestaj montoj, la malhela verdokoloro de la arbaroj kun la senfina kolora nuanco de la montetoj kaj de la herbejoj, la ravaj kaj diversaj pejzaĝoj, la bela « Cortina » kun la ĉarmaj kaj ridetantaj vilaĝoj tie ĉi kaj tie ŝutataj, la karakterizaj blankaj kaj puraj domoj; ĉio ĉi kunigita kun la ĝentila gastemeco de la loĝantaro kaj kun la komfortoj, kiujn prezentas la multnombraj hoteloj, aliigas Ampecan valon en enviinda somera amuziga loko.

Cortina, januaron 1928.

Bruno Apollonio.

KARNIA LEGENDO

STRANGA natura fenomeno okazas de tempo al tempo en la pentrinda *Canal di S. Pietro* kie la torento *Muje*, malsuprenirante de la monto *Moskardo*, sin jetas en la riveron *But*: tie kelkfoje la superakvo ŝanĝas la skistecan flankon de la monto en grandan kotan fluaĵon. Tre malrapida sed nehaltigebla ĝi trenas arbojn kaj ŝtonegojn, dezertigante la multe trairatan straton kaj la herboplejnajn paŝtejojn substantajn.

Tre gravaj kaj multkostaj konstruaĵoj estus necesaj por eviti la teruran fluadon, kaj la karnia loĝantaro ne povas ilin entrepreni.

Je tia fenomeno inspiriĝis karnia legendo, aludita de *Carducci* en lia odo *In Carnia*:

Foje vivis en *Paluzza* avara bienulo, nomita Silvero. Tiam la moskardaj paŝtejoj estis la plej belaj de *Paluzza* ĝis *Timau*, kaj ili varme ekscitis la avidecon de l'avarulo, kiu el ili havis nur malgrandan parton. Profitante de la longa foresto de la posedanto de la samlimaj teroj, li plilarĝigis kaŝite iom post iom la limojn de sia kampo.

Kiam la posedanto revenis, li ekvidis la fiagon de la najbaro, kaj senprokraste denunciis lin antaŭ la estraro de la vilaĝo. La estraro invitis Silveron senkulpigi kaj la posedanton mem certigi per dokumentoj sian rajton. Sed bedaŭrinde ĉi tiu ne povis tion fari, kaj Silvero siaflanke kulpigis lin je kalumnio.

Tial, laŭ kutimoj kaj moroj de l'epoko, ĉion oni pretigis por la solena ĵuro sur la kampo mem, kaj en la fiksita tago ĉiuj interesavantoj kune kun multaj rigardantoj iris sur la monton *Moskardo* kaj tie Silvero laŭte kaj firme ĵuris ke

li marŝas sur tero de li legitime posedita. Antaŭ la sankteco de la juro neniu protestis, kaj tiel la bieno restis al li.

Nu, la ruza Silvero ne kredis esti tute falsjurinta, ĉar antaŭ la ceremonio, laŭ konsilo de sia edzino, kaŝe li metis teron de siaj vere legitimaj posedaĵoj en siajn lignoŝuojn.

Sed la popola konscienco, laŭ tia idealo de absoluta justeco ĉiam sopirita de la homaro, ne povas konsenti ke tiaj ruzoj restu sen puno. Kaj la legendo tiel daŭriĝas:

Post iom da tempo iuj valanoj, revenante vespere de siaj kamparaj laboroj, aŭdis funebran sonoradon el la preĝejoj de *Paluzza*. Ili sin demandis kiu tie povas esti mortinta, kiam ili vidis Silveron, kiu ŝajnis iri de sia vilaĝo al *Moscardo*, kun la pikfosilo sur la ŝultro. Do ili demandis al li:

— Kiu mortis en *Paluzza*?

Li respondis:

— Silvero mortis.

Kaj subite li malaperis antaŭ la vilaĝanoj mir- kaj terur-plenaj.

De tiam falsjurinta Silvero estas kondamnata detrui per siaj manoj mem la bienon malbone akiritan.

M. A. Camurri.

Ĉu vi deziras, ke U E A vivu kaj prosperu? Se jes, pagu kiel eble plej baldaŭ vian kotizon de Membro-abonanto. Se vi estas favorito de l'sorto aliĝu kiel Membro-subtenanto aŭ kiel Membro dumviva.

U E A bezonas vin!



ĜIS LA CELO!

*La malvarma nebula vetero
Enuigas dumvintre senĉese,
Sed tritik' radikiĝas sub tero,
Por ĝermadi printempe progrese.*

*La kuristo ne kuras rapide
En komenco de longa kurado;
Li laciĝus tro frue memfide,
Al li mankus necesa daŭrado.*

*Kiu volas belegan atingi
Malebenan neĝbrilan altaĵon,
Ja ne saltas por sin vantdistingi,
Sed popaŝe li gajnas krutaĵon.*

*Jen ankoraŭ nebula vetero
Esperanton malhelpas senĉese;
Kiel gren' radikiĝas sub tero,
Ĝi ĝermados printempe progrese.*

*Esperanto ne kuras rapide
En komenco de longa kurado;
Ne laciĝas ĝi tiel memfide
Kaj ne mankos necesa daŭrado.*

*Ĉar ĝi volas belegan atingi
Malebenan neĝbrilan altaĵon,
Ĝi ne saltas por sin vantdistingi,
Sed popaŝe ĝi gajnas krutaĵon.*

*Ĝi rigardas la celon grimpante
Lumigatan de l' suna radio,
Kaj spiregas senĉese ŝvitante,
Por alveni ĝis l' alta vizio.*

*Esperantoj de l' nuna momento,
Fortalgrimpu Paltajon radian,
Kaj l' homaro kun plena konsento
Himnon kantos en dank' harmonian.*

P. Silvo Ravanelli.

BRAMANTE, MIKELÁNGELO KAJ RAFFAELLO

Bramante en Romo



BRAMANTE eltrovis la forton de sia genio en Romo. Lia vera juneco floris en maljunago. Kaj ĝi estis glora pro faraĵoj kaj pro revoj, kiel tiu de lia samlandano kaj amiko Raffaello. La 25 jaroj, kiujn li travivis en Milano, ne inspiris aŭ ne permesis al ĉi tiu artisto eĉ nur unu ĉefverkon. Ĉio, kio restas al ni el la bramantea verkaro en la ĉefurbo kaj en la regiono lombardiaj estas necerta kaj fragmenta.

Bramante foriris el Milano dum la rapidfalo de la ŝanco de Moro, kaj li venis al Romo en 1499. Tie li havis kelkajn amikojn, kaj, kiel raportis Vasari, oni komisiis lin pentri en S.^a Johano en Laterano, supre de l' Sankta Pordo, kiun oni malfermas okaze de l' Jubileo, blazonon de Papo Aleksandro VI, freske laboratan, kun anĝeloj kaj figuroj, kiuj ĝin subtenas. Malgrandan dekoracian laboraĵon, kiel oni ekvidas, kiun oni estus povinta komisi al in ajn juna pentristo.

Kardinalo Olivjero Caraffa [pr.: Karaffa] volis konfidi al li la peristilon de l' Monaĥejo de l' Paco. Al ĉi tiu verko la arĥitekturisto tre diligente atentis, kaj baldaŭ ĝin alkondukis al fino. La kolonoj starigitaj sur la supraĵo de l' arkajo de l' teretaĝo estas en la peristilo de l' Paco belega arĥitektura inventaĵo. La nomo Donato Bramante eksuperflugis al ĉielo de l' gloro. Bramante ne havis plu alian mankon krom tiu de l' tempo, pro kiu li devis rapidlabori, ofte malbonigante la fortikecon de siaj konstruaĵoj.

La verkoj. — Unu el liaj unuaj romaj verkoj estas la templo de S.^a Petro en Montorĵo, sur Ĝanikolo. Ĉi tiu arĥitektura juvelo estas la unua produktaĵo pure kvincenta de lia genio liberiginta de ĉiuspeca influo, de ĉiuspeca rememoro de la toskanaj kvarcentaj majstroj. En la barberinia ¹⁾ albumo de Juliano de S.^a Gallo kaj en aliaj kolektoj de klasikaj monumentoj oni trovas ame desegnitajn ĉi tiun templeton, kiel floro el la plej elektitaj antikvaj tempoj.

Bramante aperas al la nuntempaj artistoj nova Vitruvio. El la eternaj reguloj de l' granda roma arĥitekturisto Bramante estis farinta al si evangelion, kiun li mem komentariis kun granda libereco, ĝin interpretante sur la disaj ruinoj de l' urbo. Ĉi tiuj ruinoj estis al li kaj al la aliaj kvincentanoj, kiuj ilin atente kopiis, vivantaj modeloj por l' inspiro de novaj konstruaĵoj. En la posta jarcento ili diradis al la artistoj nenion, escepte parolon de pentrarta estetiko. Ili estis forlasitaj de la arĥitekturistoj, revivante nur en la fantazioj de l' pentristoj, kiuj kreis la manieron *de l' ruinoj* por la pejzaĝa pentrado.

Bramante observis la romajn ruinojn kun viva rigardo de konstruisto.

La kiosko de S.^a Petro en Montorĵo, inspirata de l' templo de Vesto, kaj de tiu de la « Sibilo » (Antaŭdiristino) kun l' anstataŭo de l' « dorika » al la « korintia », enhavas la muzikan ideon, kiun l' artisto estis triumfigonta en la grandioza koncepto de l' Vatikana Baziliko. La templo, laŭ la desegno de

¹⁾ Barberinia, t. e. de la nobela familio Barberini.

Bramante, devis ekstarti meze de vasta ronda ĉirkaŭlino kun portiko je izolaj kolonoj, kun kvar enirejoj, kun kvar kapeletoj en la anguloj kaj niĉo inter ĉiu kapelo kaj ĉiu enirejo. Skizo « Sangruĝa » (itale: « a sanguigna ») de l' Majstro en la Oficejoj montras al ni kiel ĉi tiu sama ideo superregis lin, kiam li atendadis al la sistemigo de la spaco ĉirkaŭ la Vatikana Baziliko: ankaŭ ĉi tie estas portiko, kiu distance reprenas la eksterajn liniojn de l' preĝejo, igante preskaŭ plastika resonado de l' centra « motivo ». (It.: motivo »; fr.: « motif »).

Donato Bramante estas la unua arkitekturo, kiu serioze montris pripensi al la ĉirkaŭaĵoj de l' monumentoj. Bernini subigis l' efekton de sia portiko al tiu de l' placo kaj de l' fasado de S.^a Petro: Bramante anstataŭ volis ke la portiko estu arkitektura disradiado de l' tuta baziliko. Ĉiu alia dekoracia funkcio de l' portiko estus aperinta al li ekstera al la logiko de l' konstruaĵo.

Mirindaj bramantaj kreitaĵoj estas en Romo la Kortoj de S.^a Damaso kaj la Belvedejo (it.: « Belvedere »; fr.: « Belvédère »). La desegno de ĉtiu lasta, kiel rimarkas Milizia, severa juĝisto, estas el la plej lerte trovitaj kaj majesta.

Dume la fera volo de Julio II puŝis Bramante'n al la konstrua sistemigo de Romo, kiun li komencis de Strato Julia (it.: Via Giulia [pr. Ĝulja]) laŭlonge kiu devis stari ĉiuj la Oficejoj kaj la Kurioj (Kuriejoj) de l' urbo. Kredeble la granda arkitekturo sin okupis ankaŭ pri la problemo de l' subteraj akvoj de l' urbo kaj pri tiuj de Tevero.

Sur la placo S.^a Petro kaj en Transtevero li starigis fontomonumentojn, bone intuiciante ke l' akvo estas unu el la precipaj faktoroj de l' roma beleco. Dum li zorgis pri la konstruo de l' Korto de

la Kancelario, de l' preĝejo de S.^a Laŭrento en Damaso kaj de aliaj konstruaĵoj, li febre pretigis la projektojn, kiujn li ne povis fini, kaj kiujn aliuloj devis efektiviĝi laŭ liaj postsignoj.

Bramante, Mikelanĝelo kaj Raffaello

Aregoj de junaj artistoj ĉirkaŭis lin, inter kiuj superregis Raffaello Sanzio [pr. Sanzjo]. Ĉi tiuj disĉiploj estis ideale revokataj de Sanzio en la fama sceno de Atena Skolo, kie en la figuro de Arkimedo li kliniĝas kun la cirkelo super ardeztabulon kuŝanta sur tero, kaj proponas al ili geometrian problemon. La junuloj staras atente kaj malpacience: de Bramante oni vidas la vastan nudajn de l' genia kapo kaj la potenca manon. Al lia preferamata disĉiplo devis poste aparteni la palaco Caprini [pr. Kaprini] konstruita de Bramante mem.

La bramantea genio mirinde klarigis en Romo, kie ĝi forjetis ĉiun superfluan ornamadon, kie ĝi forlasis tiun agrablajn, kiun eksentis ĝiaj verkoj de Lombardio: ĝi plinoblis, plipurigis, plimoderigis.

Idealoj frataj de la beethovenaj simfonioj, la bramanteaj konstruaĵoj havas firman kaj solidan aspekton, helan kaj originalan melodian linion, varian kaj riĉan ritmon, elegantan graciecon en la dekoraciaj fragmentoj, kaj fine ili malkaŝas la supersekretan de ĉiu arkitektura kaj muzika belajo en la mutaj interspacoj, en la largaj esprimoplenaj silentoj. Bramante, Raffaello, Beethoven estas artistoj die apoloniaj: kiam ili suferas, ilia sufero estas serena. La Transfigurigo, la Naŭa Simfonio, la Kupolo fantaziita de Bramante por S.^a Petro estas tri himnoj tre superaj de l' homa Ĝojo venkanta Doloron.

Post Raffaello, Bramante, Beethoven, la geniuloj estas nomataj Mikelanĝelo,

Bernini, Wagner. Iliaj ĉieloj estas ven-
tofuriozaj: frakasigas la bela linia « eŭ-
ritmio; artisma revolucio en la signifo
de movado. Tiel estis ĉiam. Post la ar-
to de Fidio kaj de Prassitelo, tiu de la
Skolo de Bergamo rimarkigas la alve-
non de l'arto, kiun oni nomadas baroka,
kiun malprave la kritikistoj kutimis tru-
di en nia XVII jarcento.

Mikelangelo, kiu estas vere la patro
de la sescenta baroka arto, tiel en pen-
trado kiel en skulptado, volis anstataŭ
persiste resti fidela kiel arĥitekturisto al
la instruadoj de Bramante: tiel li fakte
skribis al sia amiko: « Oni ne povas
nei ke Bramante estis arĥitekturisto lerta
kiom ĉiu alia, kiu vivis de post la an-
tikvaj tempoj. Li metis la unuan ŝtonon
de S. Petro ne plenan je konfuzo, sed
klaran kaj puran kaj helan, kaj ĉirkaŭe
izolatan tiamaniere ke ĝi ne malutilas al
io en la palaco ». Kaj li aldonis: « Kiu
ajn malproksimiĝis de la dirita ordo de
Bramante, kiel faris S. Gallo, malprok-
simiĝis de l' vereco ». Sciate estas, ke
Mikelangelo, kiam estis preferelektata por
la konstruo de S. Petro, intencis daŭr-
sekvi sian verkon laŭ la bramantea kon-
cepto de la greka kruco por la baziliko,
kaj ke l'ideo de la latina kruco venkis
nur en la tempoj de Paŭlo V per Karlo
Maderna pro la ortodoksaj postuloj de l'
romana Kurio.

Sed Bramante ne en Mikelangelo, sed
en Raffaello devis ekvidi sian fratan
spiriton, kaj ĉi tion li volis montri kiel
daŭriganton de sia agado en la konstruo
de S.^a Petro, kiam li sentis ke morto
alproksimiĝas. Tio aperas el la brevo
de Leono X al Raffaello, kies parto jene
diras: « En pentrarto (kiel la tuta mon-
do scias) vi estas superega sed tia vi
« estas ŝatita de l'arĥitekturisto Braman-
te ankaŭ en la konstruarto, tiamaniere

« ke li, ĉe lia morto, prave opiniis, ke
« oni al vi povus doni la taskon estre
« zorgi por la daŭrigo de l' konsrtuado
« de li komencita ĉi tie en Romo de l'
« templo al la Princo de l' Apostoloj ».

La difino de l' Bramantea arto, espi-
mata de Mikelangelo, multe konvenas
al tiu de Raffaello. Sed l'arto de Mike-
langelo estas nökta, penige batalanta
kontraŭ la interna dubo, agitata kiel lia
animo, invadata de heroa doloro kaj
mistika en la plej profunda senco de
l'vorto. Ne estas ombro de internaj
bataloj en la verkoj de l' du marklan-
daj artistoj. Dum Mikelangelo estas jam
modernulo, Bramante kaj Raffaello estas
homoj plene vivantaj en la spiritoj kaj
en la ideoj de l' Renesanco; plenaj je
la dieco de tiuj antikvaj animoj, kiuj
kreis la tomplojn de Ellado kaj de Ro-
mo. Ili do povis sin kompreni kaj reci-
proke sin helpi travivante saman idea-
lon. Dum, tie, kie Bramante ligas kaj
trudas en arĥitekturaj linioj kaj « moti-
voj » sian pentrarton, Raffaello ĉi tiujn
liniojn aŭ ĉi tiujn motivojn submetas al
la pentrarta funkcio. Sed la proksiman
parencecon, kiu ambaŭ ilin kunligas,
bone oni ekvidas en iuj verkoj de San-
zio, t. e. en tiuj, kie la pentrado viva-
das pli intime kunigita kun arĥitekturo:
en la Vatikanaj Logioj kaj en la Ĉambroj
(it.: Stanze): en iuj arĥitekturaj verkoj
kiel en la preĝejo de S.^a Eliĝio de
l' Oragistoj. En la lastaj jaroj de Raffae-
llo lia spirito aperis invadata de tiu ega
songo de konstrualiformigo de l' urbo,
songon kiun nur la morto povis pereigi
en la animo de Bramante, kaj kiu la
morto same pereigis en la koro de lia
inda spirita heredanto.

Laŭ artikolo de P. Misciatelli en « Arto kaj Vivo ».

Trad. A. Mazzolini.



KIKIBJO, KUIRISTO DE KONRADO GIANFIGLIAZZI, PER SIA PRETA FRAZO
POR SIA SAVO, LA KOLERON DE KONRADO IGAS RIDON KAJ SIN
MEM SAVAS DE MALBONA ŜANCO KIUN AL LI MINACIS KONRADO.

KVANKAM la sprite rapidemaj, amemaj virinoj, ofte frazojn donas tiel utilaj kiel belaj, laŭ okazantaĵoj, al la ekparolontoj, ankaŭ la sorto favora, iam helpanto por la timemuloj, je ilia lango tuje iajn parolojn metas, kiajn neniam ilia elparolinto estus scipovinta trovi, se lia animo estus estinta trankvila: kaj tion mi per mia novelo intencas montri al vi.

Konrado Gianfigliuzzi ¹⁾, tiel kiel ĉiu el vi povas esti aŭdinta kaj vidinta, ĉiam en nia urbo ²⁾ estis nobela civitano, liberema, grandanima: kaj kavalire vivante, senĉese je hundoj kaj birdoj plezuris kaj sin amuzis, forlasante nun ĉi tie preparoli liajn pligravajn agojn. Estante iun tagon per sia falko mortiginta apud Perètola ³⁾ unu gruon, ĝin vidante grasa kaj juna, li ĝin portigis al sia lerta kuiristo, kiu estis nomata Kikibjo ⁴⁾ kaj estis Veneziano; kaj ĝin alportigis ordonante ke por la vespermanĝo ĝin rostu kaj bone arangu. Kikibjo, kiu tiel ŝajnis kiel estis naivulo, aranĝinte la gruon, ĝin supermetis apud fajro kaj zorgeme ĝin ekkuiris. Kiam ĝi estis preskaŭ kuirita, de ĝi elvenante tre granda odoro, okazis ke iu virineto el tiu sama strato, kiu estis nomata Bruninjo, je kiu Kikibjo estis varme enamiĝinta, eniris la kuirejon: kaj sentante

la odoron de la gruo kaj ĝin vidante, kore petis Kikibjon ke li al ŝi donu de ĝi unu femuron. Kikibjo respondis al ŝi kantante, kaj diris: « Vi ĝin ne havos de mi, madono Bruninjo, vi ĝin ne havos de mi ». Pro kio Bruninjo malkontentigita, al li diris: « Je la nomo de Dio, se ci ĝin al mi ne donos, ci ne havos de mi ion ajn kio al ci plaĉus ». Kaj mallonge: la paroloj estis multaj, fine Kikibjo por ne kolerigi sian virinon, depreninte unu el la femuroj de la gruo, ĝin al ŝi donis. Estante poste metata antaŭ Konrado kaj iu lia gasto la gruo sen la femuro, Konrado, mirante pro tio, vokigis Kikibjon kaj lin demandis kie estis la alia femuro de la gruo. Al li la mensogema Veneziano tuj respondis: « Sinjoro, la gruoj havas ne pli ol unu femuron kaj unu kruron ». Konrado tiam, iom kolerigita, diris: « Kiel diable? ili havas nur unu femuron kaj unu kruron? ĉu mi neniam vidis gruojn krom ĉi tiu? ». Kikibjo daŭrigis: « Tamen estas, sinjoro. kiel mi al vi diras; kaj kiam vi deziras, mi tion al vi vidiĝos ĉe la vivantaj ». Konrado, pro amo al la nehejmanoj kiujn li havis kune, ne volis sekvi babilajojn, sed diris: « Ĉar ci diras ke ci tion vidigos al mi ĉe la vivantaj gruoj, kion mi neniam vidis nek aŭdis diri ke estas, mi ja tion volas vidi morgaŭ matene, kaj estos kontenta: sed mi ĵuras al ci je la Krista

1) Elp: Ĝanfliacci. — 2) Firenze. — 3) Vilaĝeto apud Firenze — 4) Itale Chichibio.

korpo ke, se estos alie, mi igos trakti cin tiel malbone ke ci je cia malfavora sorto memoros ĉiam ĝis kiam ci vivos pri mia nomo ». Finiginta do dum tiu vespero la interdisputo, la sekvantan matenon kiam la tago aperis, Konrado, kies kolero ne estis pro la dormado ĉesinta, ankoraŭ malkvieta levigis kaj ordonis ke la ĉevaloj estu alkondukataj; kaj deviginte Kikibjon supreniri malbonan ĉevaleton, al iu rivero sur kies bordo ĉiam je tagiĝo kutimis kunveni grupoj, lin kunkondukis, dirante: « Baldaŭ ni vidos kiu el ni estas mensoginta hieraŭ-vespere, ĉu ci aŭ mi ». Kikibjo, vidante ke ankoraŭ daŭras la kolero de Konrado kaj ke li estas devigota pruvi sian mensogon, ne sciante kiel tion fari, rajdis apud Konrado kun la plej granda timo de la mondo, kaj volonte estus, tion povinte, forkurinta; sed ne povante, nun antaŭe nun poste kaj flanke rigardadis, kaj ĉion kion li ekvidis, kredis esti grupoj starantaj sur du piedoj. Sed jam venintaj apud la rivero, li antaŭ ol aliuloj ekvidis sur ties bordo ja dekdu grupojn, kiuj ĉiuj staris sur unu piedo, tiel kiel ili kutimas fari dormante. Tial do tuj montrante ilin al Konrado, li diris: « Plej bone vi povas, sinjoro, vidi ke hieraŭvespere mi diris la veron, grupoj havas nur unu femuron kaj unu piedon, se vi rigardas tiujn, kiuj tie staras ». Konrado ilin vidinte diris: » Atendu, mi montros al ci ke ili du kruojn havas »: kaj iom pli alproksimiĝinta al ili ekkriis: *ho ho*: pro tiu krio la grupoj, elsendinte teren alian piedon, ĉiuj post iom da pasoj komencis forkuri. Tial Konrado sin turnante al Kikibjo diris: « Kio ŝajnas al ci, frandemulo? Ĉu ŝajnas ili havi du kruojn? ». Kikibjo, kvazaŭ timigita, ne scipovante li mem de kie li elvenis, respondis: « Jes, si-

njoro, sed vi ne kriis *ho ho* al tiu de hieraŭ vespere: se vi tamen tiel estus kriinta, ĝi same estus alian femuron kaj alian piedon elmetinta, kiel faris ĉi tiuj ». Al Konrado tiel plaĉis ĉi tiu respondo ke tuta lia kolero iĝis gajeco kaj rido, kaj li diris: « Kikibjo, ci ja estas prava, mi vere tion devis fari ». Tiel do per sia rapida kaj amuzanta respondo Kikibjo ĉesigis malbonan ŝancon kaj paciĝis kun sia sinjoro.

El « Dekameron » de G. BOCCACCIO [Bokkaĉĉo].

Esper. R. Orenge.

La diantoj, la rozoj kaj la violetoj

SUPERSTARIS, en ĝardeno, super ĉiuj aliaj floroj, iuj diantoj kaj karnkoloraj rozoj. Ili mokis iujn violetojn kiuj kaŝiĝis sub la herbo, tial ke li apenaŭ estis videblaj.

— Ni estas — diris la diantoj — tiel gajaj kaj diverskoloraj, ke ĉiu viro aŭ virino kiu promenas en ĉi tiu loko, ne forturnas siajn okulojn de ni, kaj ili ŝajnas neniam sataj atente nin rigardi.

— Kaj ni — diris la rozoj — ne nur estas admirataj kaj deprenataj kun tre granda amo de la junulinoj kiuj, per ni, ornamas siajn brustojn; sed niaj deŝirataj petaloj forverŝas akvon kiu per sia tre agrabla kaj delikataodoro plenigas ĉirkaŭe la tutan aeron. Ni ne scias pri kio la violeto povas sin laŭdi, ĉar ĝi havas tiom malmulte da bonodoro kiom sufiĉas por povi ĝin flari, kaj ĝi posedas nek helajn nek brilajn kolorojn kiel la niaj.

